

# STIFRO

209

## El la enhavo:

ĈEA konferencis  
Laborplano de ĈEA  
Kotizoj por 2004  
Mortis D. Kočvara  
Ekumena kongreso en Rimini  
Ĉirkaŭ la mondo  
Studoj en Poznań  
Infanoj en Italio

4  
2003

## ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Sur hotelo Dalibor en Litomyšl  
flirtis Esperanto-flago

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 10 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte),

### rete Starto:

malovec.starto@clavis.cz,

www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA:**

cea.polnicky@quick.cz (sekretario)

podhradska@volny.cz (prezidanto)

www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč,

C 100 Kč, D 500 Kč, Z 1000 Kč,

F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komentantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 15200 Praha, tel. 251 817 732, m.pluharova@worldonline.cz

**Sekcioj de ĈEA:** junulara, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, pri informadiko

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia, gazetara-informa

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:**

3330-021/0100, Komerční banka Poděbrady

ISSN 1212-009X

**Eltondajojn el ĉeĥaj gazetoj por la gazetara-informa komisiono kolektas (výstřižková služba):** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek

## Komitato de ĈEA:

**Prezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (vnější a vnitřní vztahy, čestní členové)

**Vicprezidanto (ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio):** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 222 780 677 (zápisy, koncepce, metodika)

**Vicprezidanto (komitatano A de UEA):** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinár. vztahy, UEA, vydavatelská činnost)

**Sekretario:** Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz (sekretariát, členská základna, účetnictví)

**Kasisto:** Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha, tel. 220 879 386 (konference, sjezd)

**Komitato:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, 461 532 257, dvorakovalibuse@quick.cz, dvorakova.libuse@khspec.cz (kluby a kroužky)

**Komitato:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (sekce, komise)

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Prezidanto: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vakpce.cz, tel. 466 401 942;

Věra Šlahařová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., slaharova.v@kr-ustecky.cz; Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@komercpoj.cz

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, starto@clavis.cz

**Kontrollegis:** L. Dvořáková, V. Podhradská, V. Kočvara, M. Pastrňák

**Esperanto-muzeo:** Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová, muzeum.ct@worldonline.cz

**Redakto-fermoj:** 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

## Ĉeĥa Esperanto-Asocio konferencis

Litomyšl 17-19.10.2003

En hotelo Dalibor kolektiĝis preskaŭ cent personoj el 50 lokoj.

La programo komenciĝis post la vendreda vespermanĝo, kiam s-ano Miloš Bloudek prezentis per komputilaj lumbildoj sian partoprenon en UK (li salutis la kongreson nome de ĈEA) kaj Josef Vojáček priskribis sian vojaĝon al ILEI-konferenco post la kongreso. La ĉefa konferenca programo realiĝis dum la sabata antaŭtagmezo. Prezidantino Věra Podhradská tralegis sian raporton pri la agado de nia asocio (de niaj komitato, kluboj, sekcioj), poste estis tralegita raporto de la malsaniĝinta sekretario Pavel Polnický kaj ekparolis Josef Hron nome de la kontrolgrupo. Lucie Karešová preparolis rilatojn inter ĈEA kaj UEA, Miroslav Malovec prezentis interesajn librojn en Libroservo (anstataŭ malsaniĝinta Zdeněk Pluhař), poste L. Karešová klarigis proponon de la nova kotiza sistemo. Sekvis diskuto.

La programon finis per siaj scenetoj infanoj el Česká Třebová sub gvido de Zdenka Novotná.

Posttagmeze la partoprenantoj

forveturis al Roza Herbejeto kaj reveninte promenis kun ĉiĉeronoj tra la urbo ĝis la tombejo, kie kuŝas esperantista verkisto Karolo Piĉ. Por momento venis ankaŭ Stano Marček kaj poste Vlada Hasala, kiu klarigis siajn problemojn kun perado de gazetoj.

La sabatan vesperon plenis danc-amuzo kun tombolo sprite gvidata de Kvido Janík.

Dimanĉan matenon startigis M. Malovec per prelegeto pri tri niaj litomiŝlaj verkistoj (Bubeniček, Karen, Piĉ) kaj pri OSIEK-konferenco en Prago dum la ĉijara somero.

La konferencon salutis sola eksterlanda partoprenanto Rosa Werner el Germanio.

Sekvis riĉa diskuto, kiun ni prezentos en sekvaj paĝoj. Ĉirkaŭ la tagmezo la konferenco finiĝis.

Kvankam ankaŭ Petr Chrdle malsaniĝis, lia propono de flugkaravano al UK Pekino 2004 estis je dispono por interesatoj, same kiel la libroj de KAVA-PECH. La konferencanoj aĉetis en Libroservo dum la sabata antaŭtagmezo librojn kontraŭ 5 mil kronoj (la plej granda intereso estis pri *Esperanto pro děti* de Jana Melichárková).

*Miroslav Malovec*



## El raporto de la prezidantino

*Unue ni pritaksu nian agadon de post la 10-a kongreso de ĈEA, kiu okazis pasintjare en novembro.*

**La komitato** kunvenis 5-foje. Krom unu, ĉiuj funkciuloj estas rete atingeblaj, multo estas solvebla sen renkontiĝoj. Ekde 2001 la komitato dissendas retkomunikojn, kiujn redaktas Petr Chrdle. Lucie Karešová preparis ĝisdatigitan Aktualan gvidlibron de ĈEA. La ekonomia premo devigis nin ankaŭ ellabori novan kotiz-regularon. Post problemoj kun translokigo de sciencoteknika librejo el Kladno, ĝi ekfunkciis unue en LIBROSERVO en Běchovice, fine la tuta Libroservo kun la biblioteko trovis lokon en Dobřichovice. Per tio la komitato plenumis rezolucion de nia kongreso. En la biblioteko estas ankaŭ beletro.

### **Aranĝoj.**

\* Jarfinon ni jam ne povas imagi sen silvestra maskobalo en Česká Třebová.

\* Jam la 11-a renkontiĝo "Adonido" en Vracov-Ratiškovice proponis ne nur la protektatan kreskaĵon kaj kunsidon en vinkelo, sed ankaŭ turniron en keglo-ludo kaj trarigardon de la kastelo Milotice.

\* Printempa kaj aŭtuna seminarioj

AEH en Skokovy jam apartenas al ĉiujaraj aranĝoj, ĉiam multe vizitataj pro simpatia familia etoso.

\* 80-jariĝon festis EK Přerov (pli ol 50 esperantistoj, ankaŭ el Pollando, vizito de Urba Muzeo kaj fervoja remizo).

\* Samtempe okazis tradicia renkontiĝo en Šumperk.

\* En Prostějov oni aranĝis interesan esperantistan ekspozicion

\* EK Svitavy solenis 70-jariĝon de Esperanto (plantita Esperanto-arbo en urba parko, ekspozicio en la urba kulturdomo, vizitita de televido),

\* la 2-a renkontiĝo en Plasy en pitoreska regiono.

\* Al Esperanto-tendaro en Lančov (jam 51-a) Esperanto iom post iom revenas. Nunjare tie estis 37-persona grupo el pola Białystok. Nove en Lančov oni komencis instrui ankaŭ hispanan lingvon. Tre ŝatata estas kurso de pentrado. Tradicia jam fariĝis renkontiĝo de ekstendaranoj.

\* IKUE okazigis renkontiĝon en Koclířov, tendaron en Sebranice kaj bus-eksurson al ekumena kongreso en Rimini, kiu elektis nian Miloslav Šváček kiel IKUE-prezidanton. Gratulon.

\* Pilzenanoj okazigis tradicion restadon en Nekvasovy.

\* Agentejo KAVA-PECH aranĝis OSIEK-konferencon (Intimaj temoj en Esperanto-beleto) kaj flugkaravanon al UK en Gotenburgo.

\* En Okříšky infanoj sub gvido de D-rino Bartlová instalis ekspozicion pri korespondado en Esperanto (artikoloj en regionaj gazetoj).

\* Esperanto-tago en Pardubice (filmo pri kongreso AEH en Jánské Lázně, interesa rakontado pri UK Gotenburg, pri elektronika vortaro, memoroj pri Esperanta vivo de 90-jara s-ano Mančík).

\* Ankaŭ en Polička kaj Letohrad okazis, mi kredas, interesaj renkontiĝoj, sed domaĝe, ke la organizantoj ne informis membraron pere de STARTO pli frue.

\* la 16-an internacian kulturenan festivalon en Ústí n/L partoprenis ĉirkaŭ 40 personoj, ankaŭ el Germanio kaj Svedio (koncertoj, prelegoj, vizito de Terezín). La 6-an de decembro okazos en Ústí n/L jam la 23-a Ĉeĥa-Saksa tago.

\* Kaj fine de decembro certe okazos silvestra balo en Česká Třebová.



### **Sekcioj kaj komisionoj.**

*Pedagogia sekcio* - en januara komitata kunveno, laŭ propono de prezidantino Jana Melichárková, la

komitato aprobis, ke la sekcio kuniĝos kun ekzamena komisiono kaj fariĝos pedagogia komisiono. Intereso pri korespondaj kursoj estas preskaŭ nenia. Pro forpaso de Alenka Klementová kaj grava malsaniĝo de Drahomír Kočvara restis nur unu instruistino, Mirka Tomečková, kiu en nuna tempo instruas 4 kursanojn. La komisiono organizas jam kelkajn jarojn "paroligajn kursojn" 2-foje en jaro. En februaro ĝi okazis en Brno kaj partoprenis entute 35 personoj en du kursoj (por komencantoj kaj konversacia). En la tagoj 24-a ĝis 28-a de novembro okazos internacia kurso de Esperanto en Dobřichovice (jam aliĝis franca grupo) kaj sekvas nia Paroliga Kurso, kiu finiĝos la 30-an de novembro, sed oni povas partopreni ankaŭ tutsemajnan kurson.

Jam aperis Esperanta lernolibro por infanoj, aŭtorino Jana Melichárková, profesia instruistino, ilustris Mirka Tomečková. Polaj esperantistoj el Białystok esprimis deziron eldoni ĝin en la pola lingvo. Iom post iom naskiĝas jam dua parto de la lernolibro.

Infanrondetoj ekzistas en Česká Třebová (Z. Novotná), Okříšky (K. Bártlová) kaj Ratíškovice (J. Melichárková).

Infanoj el Česká Třebová ĉiujare vizitas eksterlandon kaj prezentas siajn scenetojn. Infanoj el Okříšky atingis sukcesojn plejparte en diversaj TEJO-konkursoj en pentrado. En Ratíškovice geknaboj preparas kantojn, poemojn, fabelojn, kiujn ili prezentas dum "Adonido".

Pri kursoj en lokaj kondiĉoj ni ne povas fieri, sed eble la kursoj kaj lernolibroj en interreto plibonigos la staton.

*Sekcio de nevidantaj esperantistoj*, prezidanto Jan Přiborský. Al la sekcio aliĝis 50 membroj, sed aktivaj estas ĉirkaŭ 20. La sekcio renkontiĝas dufoje en jaro (ĉijare en Prago kaj Olomouc). En Olomouc post oficiala parto okazis en preĝejo improviza koncerto, orgenludis s-ro Jelínek, lia edzino Milena kantis spiritajn kantojn, ili ambaŭ estas komitatanoj de la sekcio.

Ĉiujare estas organizataj someraj Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresintoj en Ruprechtov (ĉijare 12 personoj). Por dek interesusuloj estas legita aŭdiokasede ĉiu numero de STARTO dank' al Michal Balík el Olomouc (jam 3 jarojn). La sekcio eldonas brajlan gazeton AŬRORO, kiu havas ankaŭ sonvarianton.

### *Sekcio de informadiko*

En interreto estas publikataj tri niaj gazetoj (Starto, Dio Benu, AEH Informilo), kelkaj urboj jam havas Esperantan paĝon (Most, Svatý Jan pod Skalou, Muzeo de Šumava en Kašperské Hory). Sian paĝon havas nia asocio, klubo en Mladá Boleslav, firmao KAVA-PECH k.a. Belan paĝon prizorgis studento Tomáš Břicháček (li vizitis la konferencon), kie li publikigis ankaŭ sian propran retan lernolibron. Plie en la reto ekzistas tri aliaj kursoj kun ĉeĥa versio: brazila (ĉeĥigis M. Malovec), de TEJO (tr. Dagmar Chvátalová) kaj lernolibro de Theodor Kilian, kiun por interreto adaptis neesperantisto s-ro Maršík.

Grandan laboron faras Josef Hron, kies vortaro sur kompakta disko havas pli ol 100 mil esprimojn.

Sur kampo de terminologio laboras Lubomír Sřreda (Terminaro de pelt-industriaj maŝinoj, Terminaro de pelt-industriaj operacioj, Propono de mamul-nomenklaturato en Esperanto, Zoogeografia partigo de la firmtero) kaj Jan Werner (Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj). Ĉe KAVA-PECH aperis ankaŭ oklingva Matematika Vortaro de Marc Bavant.



Poezion (Ludíková, Bergrová, Karen) tradukas Jaroslav Mráz (nun grave malsana), fabelojn (Němcová, Bergrová) Jiří Patera.

Enkomputiligadon de manuskriptoj kaj de malnovaj eldonaĵoj plenumas M. Malovec kun Josef Mendl. Malovec kontribuas ankaŭ al reta enciklopedio Vikipedio kaj fondis ankaŭ ĝian ĉeĥan version, kiun nun riĉigas ĉefe neesperantistoj.

#### *Komisiono KTI*

Multajn jarojn ĝin gvidas Drahomír Kočvara, kiu nun estas grave malsana. Li kolektis pli ol 10 kg da diversaj eltranĉaĵoj (nun en Česká Třebová).

#### *Esperanto-muzeo*

En muzeo troviĝas pli ol 6 mil libroj, kelkaj duoble. S-ano Pištora pensiigis, sed tamen restis fidela al Esperanto-fako eĉ en sia libera tempo. Li klasifikas postlasaĵojn (A. Bartošík, J. Mařík, J. Karen, L. Fiala ktp.), helpas al li V. Kočvara, Z. Novotná k.a. La muzeo eldonis kompaktan diskon pri Betlehemoj, inter kiuj estas menciita ankaŭ Esperanto-Betlehero de František Vácha el Jaroměř, kiun li donacis al la muzeo okaze de fondo de Esperanto-fako (1994).

#### *Libra foiro*

En aprilo poetino Věra Ludíková prizorgis vitrinon kun Esperanto-literaturo en Praga foiro Libromondo 2003 kaj unuhoran prezentadon de Esperanto. La sekvan tagon en Strž estis inaŭgurita ekspozicio de fremdlingvaj tradukoj el Karel Čapek, kie dank' al Margit Turková estis eksponitaj ankaŭ tradukoj esperantlingvaj.

#### *Konsultiĝoj*

Esperantaj organizaĵoj en Mez-eŭropo ĉijare konsultiĝis en Gliwice. Partoprenis ankaŭ Michela Lipari (UEA). La konsultiĝo estis 3-taga kaj traktis pri stato de Esperanta movado en apartaj landoj, propono por kalendaro de aranĝoj, nuna stato de UEA, kunlaboro kun landaj asocioj, Esperanto en Eŭropa Unio, preparo de venontjaraj balotoj en UEA, defendo de Esperanta kultura heredaĵo ktp.



### *Katolika sekcio*

La sekcio havas nuntempe 190 membrojn, eldonas gazeton DIO BENU kvaronjare (350-450 ekzempleroj). Junaj esperantistoj aranĝis en marto renkontiĝon por gejunuloj en Žďár nad Sázavou. En julio okazis la 12-a Katolika Esperanto-Tendaro en Sebranice (45 personoj, ankaŭ el Hungarujo). La sekcio aranĝis busan ekskurson por ĉeĥoj kaj slovakoj por partopreni la 16-an ekumenan kongreson en Rimini. Kongreson partoprenis entute 260 personoj, 46 el ĈR.

Prezidanto de la sekcio M. Švábek estis dum la ĝenerala kunveno de IKUE elektita prezidanto de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kun sidejo en Romo) por venontaj 4 jaroj.

La unuan fojon en historio fariĝis prezidanto Ĉeĥo.

Tio estas vere granda honoro ne nur por s-ano Švábek, sed ankaŭ por ni ĉeĥaj esperantistoj. Mi gratulas al li kaj deziras multajn fortojn por tiel grava pozicio kaj deziras multajn sukcesojn en la funkcio. Oni supozas, ke sub lia gvido certe IKUE prosperos.

*Věra Podhradská*



### **El la konferencaj diskutoj**

Miloš Bloudek: Kiun parton de kotizo eblas dekalkuli de la impostoj? - L. Karešová esploras kaj publikigos en Starto.

Libuše Filipová: Ĉu nia organizo povas helpi al iu meritplena membro? - Jes - laŭ la interkonsento.

Miloslav Švábek - parolis pri IKUE, dankis pro gratulo rilate sian prezidantecon, pri novaj taskoj.

Jarmila Rýznarová: informis pri AEH kaj pri letero de D-ro Trojan, neesperantisto, kiu esploris eblon envicigi retan kurson de Esperanto inter kursojn de aliaj lingvoj.

Jindra Drahotová: Kiel oni solvos distribuadon de gazetoj el eksterlando? - Podhradská: Ni atendu alvenon de V. Hasala, kiu ne plu volas esti peranto kaj estas survoje al la konferenco.

Pavel Sittauer: Ĉijare havis SET Lančov 286 partoprenantojn, el tiuj 42 por Esperanto, 87 por la angla, aliaj por la germana kaj la hispana. Sendu viajn infanojn, ĉu por Esperanto, ĉu por alia lingvo, ankaŭ tio helpos. Oni traktas kun Aŭstrio pri ĉelima kunlaboro (instruado de la ĉeĥa), kio ebligos partoprenon en la programo Phare.

Kamila Bártlová: pri infana kurso el Okříšky, ekspozicio pri Esperanto.



Jindra Drahotová: Presentis sian ĉeĥan tradukon el Esperanto (*Robineae: Ili vivis sur la tero*), por kiu ŝi sukcesis akiri neesperantistan eldonejon Volvox Globator. Cent ekzemplerojn ŝi antaŭpagis kaj nun disvendas po 200 Kč, la ceteraj aperos en librovendejoj. Nun ŝi tradukas *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins kaj serĉas kontrollegantojn.

La klubo en Mladá Boleslav jam dufoje ricevis monhelpon de la magistrato. Ricevi povas nur tiu, kiu petas, kaj la peto devas koncerni konkretan projekton.

Jiří Pištora: Esperanto-muzeo Česká Třebová festos baldaŭ 10-jariĝon. Necesas sendadi al la muzeo eĉ invitilojn por aranĝoj, ĉar post kelkaj jaroj ili estos historio, ofte nefacile trovebla en materialoj. Por heredaĵoj de esperantistoj oni alveturos eĉ aŭte.

Z. Polák: IFEF-sekcio kunlaboras ĉefe kun sekcioj en Italio, Slovenio kaj Aŭstrio. La agadon necesas motivigi per fakaj temoj kaj celoj - nur tio estas serioza por la publikado, precipe por eventufaj sponsoroj. Tradukado de historiaj materialoj en naciajn lingvojn montras al la publiko utilecon de Esperanto.

Jan Duda: antaŭ 120 jaroj en Olomouc oni fondis Natursciencan

Societon, kiu havas Esperanto-sekcion. Estas preparata ekspozicio.

La adresoj de niaj kluboj en interreto ofte ne estas aktualaj.

Libuše Dvořáková: Petos klubojn konfirmi la aktualecon kaj kompletigi retajn adresojn. Por konkretaj celoj de kluboj oni povas provi akiri financon subtenon. Por nia konferenco kontribuis la magistrato de Litomyšl per 2000 kronoj kaj la loka presejo HRG senpage presis la konferencan numeron de Starto.

Ludvík Chytil: Informas pri eldono de broŝuretoj (de muzeoj k.s.).

Josef Vojáček: Li mem laboras pri Esperanto-versio de prospekto la firmao ROSTEX. En Vyškov malaperas membroj, sed en la Universitato Masaryk de Brno li havas rondeton de studentoj de speciala pedagogio. Por instruistoj malfermiĝas ebleco de kleriĝo en Komárno eĉ rete.

Věra Podhradská: Atentigas pri ebloj, kiujn proponas al nia movado interreto. Sur la tablo kuŝas propono de Petro Chrdle pri flugkaravano al UK Pekino (sen sindevigo de interesatoj). La venontjara konferenco okazos verŝajne en Olomouc. Fine necesas danki al organizantoj el EK Svitavy kaj al la estraro de la hotelo Dalibor.

## Plán práce ĈES

**Učební pomůcky.** Dosavadní pomůcky na trhu (*Esperantem za tři měsíce*, *Esperanto pro děti, slovníky esperantsko-český a česko-esperantský, mluvnice*) doplnit druhým dílem *Esperanto pro děti* (J. Melichárková, KAVA-PECH).

**Akce.** Podzimní konference svazu (výbor), paroligaj kursoj (*pedagogická komise*), SET Lančov (Třebíč), Sebranice (IKUE), Nekvasovy (Plzeň), Plasy (Kaznějov), Internacia Kultura Festivalo, Ĉeĥa-Saksa tago (Ústí n.L.), 100 let J. Vondrouška (Brno) a další dle nahlášení z klubů. AEH pořádá Skokovy.

**Kluby.** Nový distributor Starta EK Svítavy zajistí klubům rozesílání pozvánek na setkání vložím do Starta nebo elektronickou poštou (adresy, na které chcete pozvánky dostávat, zašlete na adresu [dvorakoalibuse@quick.cz](mailto:dvorakoalibuse@quick.cz)). Výbor ĈES pomůže klubům a kroužkům se žádostmi o dotaci místní radnice (nutno doložit činnost klubu a hlavně využití požadovaných dotací) a při pořádání konferencí či kongresů.

**UEA.** Výbor ĈES zajistí platby individuálním členům.

## Prezentace na internetu

**Domény.** Propojení domén [esperanto.cz](http://esperanto.cz) (P. Chrdle) a [esperanto-cz.net](http://esperanto-cz.net) (T. Břicháček) tak, aby se vzájemně doplňovaly a nabízely spojení na další esperantské stránky.

**Kluby, sekce, komise a akce.** Zveřejnit mapku republiky rozdělenou na kraje a označit, kde se nacházejí naše kluby, a

podnítit tak regionální spolupráci. Zřídít stránky všech klubů (nebo odkazy na již existující) na našich doménách a představit tak jejich činnost. Totéž u sekcí, komisí a významných každoročních akcí (tábory, festivaly apod.)

**Periodika.** Dosud jsou na internetu zveřejňována *Starta*, *Dio Benu*, od letoška AEH zveřejňuje své *Informilo*. Pracuje se na zveřejnění *Aŭroro* (nevidomí) a zápisů ze schůze výboru. Daly by se zveřejnit i klubová bultena, pokud bude zájem.

**Kurzy na internetu.** Máme zveřejněny přihlášky na placené kurzy (písemné, tábory), nabízí se i kurzy zdarma pro samouky (brazilský, TEJO, podle Kiliána a nový kurz T. Břicháčka).

**Slovníky a literatura.** Na internetu lze zveřejňovat i slovníky (obecné i odborné) i literární díla všeho druhu (pokud je souhlas autora).

**Knihovny.** Na internetu jsou seznamy tří našich knihoven (Česká Třebová, Brno, Faka biblioteko) a seznam *Libroserva*. Lze zveřejnit další klubové knihovny, pokud bude zájem a dodány podklady.

**Města.** Svaz nabídne městům esperantský překlad jejich oficiálních stránek a postará se o systematické zpracování turistických a kulturních informací o naší zemi. Pokud města odmítnou poskytnout svůj prostor, lze využít encyklopedii *Wikipedio* a další zdroje na internetu.

**Esperantská kultura.** Zpracovat pro české uživatele přehled o esperantské kultuře, zvláště osobnostech, literatuře a velkých kulturních akcích.

**Soutěž:** Vyhlásit soutěž o nejlepší internetovou stránku esperanta.

**Vážení přátelé,**

blíží se konec roku, kdy bilancujeme svou práci za minulý rok. Prostřednictvím zpráv ve STARTU, na konferenci a na jiných našich akcích jste informováni o činnosti jak výboru, tak i celé naší organizace. Mimo jiné také o neutěšené finanční situaci. Před časem jsme se obrátili na doživotní členy se žádostí o finanční příspěvek a výsledek nás velmi mile překvapil.

V r. 2003 je 880 esperantistů členy ČES, což je méně než v minulých letech a současně nemůžeme předpokládat, že se naše členská základna začne výrazně rozšiřovat. Kromě členských příspěvků nemáme žádný jiný zdroj finančních prostředků a i přes úsporná opatření přijatá výborem ČES nestačí naše současné příjmy k pokrytí nezbytných nákladů. Z těchto důvodů se výbor rozhodl zvýšit členské příspěvky a změnit příspěvkový řád. Tento nový příspěvkový řád byl členům předložen na konferenci ČES v Litomyšli a po připomínkách je zveřejněn v tomto čísle STARTA.

Obracím se proto na vás, členy ČES, abyste naši nelehkou situaci pochopili a přijali tento nový příspěvkový řád, ve kterém je u každé kategorie příspěvku určeno jeho využití.

S blížícím se koncem roku 2003 přeji Vám všem úspěšný vstup do nového roku 2004, pevné zdraví, spokojenost, štěstí a hodně prožitků a úspěchů ve vašem esperantském životě.

Děkuji za pochopení a těším se na další spolupráci.

*Věra Podhradská,  
předsedkyně ČES*

### **PŘÍSPĚVKOVÝ ŘÁD ČES pro rok 2004**

- a) Povinností každého člena ČES je vybrat si minimálně základní kategorii A, B nebo C k placení příspěvku na rok 2004.
- b) Pokud se člen ČES rozhodne pro rok 2004 výrazněji podpořit činnost ČES, může si místo základní kategorie vybrat jednu z dárcovských kategorií. V těchto kategoriích může ČES na požádání vystavit doklad o přijetí daru, na požádání je také možné zachovat anonymitu dárce. Zaplacením v těchto kategoriích nevzniká povinnost platit členské příspěvky v dalších letech v dárcovské kategorii – je možné se (automaticky) vrátit k základní kategorii.
- c) ČES zachovává kategorii doživotních členů se všemi dosavadními výhodami, avšak rozhodnutím výboru ČES nebudou od r. 2004 přijímáni noví členové do této kategorie.
- d) Při vstupu nového člena do ČES je krom členského příspěvku vybíráno zápisné ve výši 20,-Kč, které je



určeno na vystavení členské legitimace a zanesení do databáze ČES.

e) Pokud klub nebo kroužek ČES poukáže hromadně platbu členských příspěvků a zašle seznam platících členů tajemníkovi ČES do 31.12.2003, získá slevu ve výši 10%, která bude připsána na subkonto klubu nebo kroužku v účetnictví ČES.

### 1. Základní kategorie

**Základní kategorie A (řádné členství)**, která pokrývá roční náklady na přípravu, tisk a distribuci Starta, administrativní výdaje a vedení účetnictví

Roční příspěvek: **300,- Kč**

Kategorie: osoby ekonomicky aktivní  
Členské výhody: odebírat svazový časopis Starto, využívat nabízených služeb ČES - se slevami, právo volit a být volen (po dosažení 18 let věku) do orgánů ČES a další dle Stanov ČES

**Základní kategorie s poskytnutou slevou B (řádné členství)**,

která pokrývá náklady na přípravu, tisk a distribuci Starta

Roční příspěvek: **200,- Kč**

Kategorie: osoby ekonomicky neaktivní – studenti, důchodci, invalidní důchodci, rodič na mateřské dovolené

Členské výhody: jako členové v kat. A

**Základní kategorie příznivců C**

**(přispívající členství)**, která přispívá na administrativní výdaje.

Roční příspěvek: **100,- Kč**

Kategorie: rodinní příslušníci, příznivci, mohou uplatňovat osoby nevidomé

Členské výhody: právo využívat nabízených služeb ČES - se slevami

## 2. Dárčovské kategorie

(Na vyžádání bude vystaveno potvrzení o daru pro odpočet z daňového základu nejen podnikatelů, ale i všech zaměstnanců.)

**Dárčovská kategorie D,**

která pokrývá náklady na přípravu, tisk a distribuci Starta, administrativní výdaje, náklady na provoz knihovny (libro-servo) a nájemné knihovny

Roční příspěvek: **500,- Kč**

Členské výhody: jako členové ČES v kat. A (řádné členství)

**Dárčovská zlatá kategorie Z,**

která podporuje rozvoj ČES (doplňování knihovny a její provoz, vydání vlastní literatury, vypsání a poskytnutí grantů na odbornou činnost klubů a sekcí)

Roční příspěvek: **min. 1. 000,-Kč**

Členské výhody: jako členové ČES v kat. A (řádné členství)

**3. Kategorie doživotních členů F**

je kategorií členů ČES, kteří v minulosti jednorázově výrazně podpořili činnost ČES

Roční příspěvek: **dobrovolný**

Členské výhody: jako členové ČES v kat. A (řádné členství)



**Drahomír KOČVARA**  
**(1929-2003)**

Honora membro de ĈEA, konata de ĉiuj kiel Drahoš, mortis post grava malsano la 20-an de novembro 2003.

Drahomír naskiĝis la 29-an de januaro 1929 en Dobrá apud Frýdek-Místek. Frekventinte superan popollernejon en Vratimov li poste lernis metion de aŭtomekanikisto. En la jaroj 1947-1949 li studis ĉe dujara majstra teknikumo en Ostrava, poste li ricevis laboron en Moravia-Silezia Armaturfabriko en Vítkovice. Laborante li samtempe altigis sian kvalifikon per studado ĉe Supera Teknikumo en Ostrava-Vítkovice. Post la baza soldata servo li dungigis kiel majstro de produkta ekzercado ĉe la tiama Ŝtataj Laboraj Rezervoj, kiu post kelka tempo ŝanĝiĝis je Faka metilernejo de VŽKG (Ferfabriko Klement Gottwald), kie li laboris en diversaj funkcioj ĝis emeritiĝo.

Esperanton li renkontis hazarde en 1947 kaj tuj aliĝis al la kurso de V. Slaný en Ostrava. Fininte ĝin, li fariĝis membro de unu el la kluboj en Ostrava (en hotelo Imperiál). Poste kreis kun aliaj junaj klubanoj (L. Klegová, L. Kyselý k.a.) junularan grupon, kiu memstariĝis kiel "Junularo Ostrava" kaj poste kiel klubo en Vítkovice, en kiu li laboris en gvidaj funkcioj ĝis la ĉijara malsaniĝo.

En 1949 li partoprenis en Liberec sian unuan asocian kongreson kaj en Rožnov pod Radhoštěm Someran Esperanto-Lernejon. Venontjare li jam apartenis al la preparokomitato kun M. Skařupová kaj V. Slaný. Dum la soldatservo (1951-1953) li engaĝis sin en la Esperanto-klubo Přerov, por kiu li akiris junajn membrojn kaj gvidis tie kursojn.

Post malfondo de la ĉeĥoslovaka esperantista asocio (1952) transprenis aktivecon junularaj grupoj de kluboj en Ostrava, Opava, Prago, Lanškroun k.a. Estiĝis ĉeĥoslovaka Esperanto-junularo, firma organizo kun regionaj komisiitoj. Drahomír iĝis membro de la gvidantaro. Li partoprenis organizadon de konferencoj, eldonadon de la junulara bulteno *Tagiĝo*, poste *Junularo agu*, instruis Esperanton en lernejoj kaj

uzinaj kluboj. Post malapero de SEL en Rožnov li organize kunlaboris ĉe preparoj de Someraj Esperantotendaroj en Chvalatice, Lančov kaj aliaj kun diversaj funkcioj (instruisto, programestro, tendarestro ktp.).

En la jaroj 1959-1969 funkciis oficiala Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato laŭ direktivoj de la politika sistemo. Drahomír en ĝi laboris kiel reprezentanto de junularo en funkcio de vicprezidanto. En 1969 fondiĝis Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Drahomír fariĝis membro de la Centra Komitato en diversaj funkcioj, dum la unuaj dek jaroj kiel vicprezidanto, poste li aktivis ĉefe en MEM (Mondpaca Esperanto-Movado), eĉ kiel ĝia ĝenerala sekretario

En la 90-aj jaroj entuziasma gvidanto de komisiono por informado, kolektanto de gazetaj eltondaĵoj pri Esperanto, kies kopiojn li dissendadis por plua utiligado en la kluboj. Unu el gravaj rezultoj de lia laboro estis broŝureto pri E-monumentoj en Ĉeĥio. Li produktis ankaŭ vicon da insignoj kaj bildkartoj pri Esperanto. La honoran membrecon li ricevis en 1989 dum festotagoj de la asocio en Havířov.

Ni ĉiuj lin memoras kiel ĉiam ridetantan propagandiston kaj oratoron kun tondra voĉo, per kiu li

entuziasme prezentis siajn diskutajn kontribuojn pri la laboro de siaj klubo kaj komisiono kaj pri Lančov.

*Výbor ČES*

*Mi dankas al ĉiuj esperantistoj pro iliaj kondolencoj, partopreno ĉe la sepulto kaj la flordonacoj kaj ankaŭ pro silenta teno de mia ŝatata edzo en viaj memoroj.*

*Květa Kočvarová*

## Doktoriĝo

Inĝ. Petr Deák, ano de Esperanto-rondeto en Teplice, ricevis la 14-an de novembro 2003 en Alta Ekonomia Lernejo en Prago sciencan titolon PHILOSOPHIAE DOCTOR. La 9-an de decembro li krome ricevos en Karola Universitato en Prago titolon MAGISTRO DE FILOZOFIO. Ni kore gratulas lin.

## Korekto de la redaktoro:

En Starto 2/2003 mi publikigis artikolon pri esperantisto Jaroslav Novobilský. La artikolon mi iomete mallongigis, por ke ĝi ne transpaŝu la paĝon kaj tiel estiĝis eraro, ke "lia Esperanta aktiveco gvidis al lia persona tragedio". Prof. Vlastimil Novobilský atentigis min, ke lia patro pereis pro sia kontraŭfaŝisma agado kaj ke la frazo devis ĝuste teksti: "Oni ne povas ekskludi la ideon, ke lia Esperanta aktiveco estis unu el la kialoj de lia persona tragedio."



## Jaroslav Mařík - 90

La 22-an de decembro ĉijare pasos 90 jaroj depost naskiĝo de Jaroslav Mařík, elstara ĉeĥa esperantisto, kies personeco eniris historion ne nur de la enlanda, sed ankaŭ de la monda Esperanto-movado. Profesie li estis teknikisto de patent-jura fako de Agromaŝina Esplorinstituto en Prago, ekde 1974 emeritulo.



Ellerninte Esperanton en 1934 li restis fidela al ĝi ĝis sia morto la 5an de majo 1997. Pro ŝia meritplena laboro li estis nomumita honora membro de Universala Esperanto-Asocio, honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj honora prezidanto de la Klubo de Esperantistoj en Prago.

J. Mařík estis respektata prilingva fakulo, kiu dum sia tuta vivo konsciencie poluris sian lingvouzon. Li estis altnivela tradukanto de fakaj kaj artismaj tekstoj, eksterordinare bona konanto de E-historio

kaj literaturo, modela prononcanto de la lingvo (li aktivis kiel profesia radio-parolisto en la E-sekcio de radio Praha, 1946-1950), sperta defendanto de nia Afero kaj lerta aŭtoro de granda nombro da priesperantaj eseoj. Esperanto dominis lian vivon, precipe post kiam li pensiigis. Li atenteme sekvis evoluon de la en- kaj eksterlanda E-movado, li kompetente reagis kontraŭ atakoj rilate ĝin, sisteme kolektis argumentojn favore al nia lingvo kaj neniam dubis pri la grava rolo de Esperanto en la tuthomara estonteco.

Krom la organiza laboro en diversaj funkcioj (komitatano kaj ĝenerala sekretario de Esperanto-Asocio en ĈSR, 1938-1952, komitatano de UEA 1950-1951, ĉefdelegito de la Esperanto-Junularo en ĈSR, 1955-1957, prezidanto de Esperantista Klubo en Praha, 1958-1961 k.a.) li estis aŭtoro de "Resuma historio de la Esperanto-Movado, 1955, de Esperanto-versioj de diversaj terminaroj, tradukinto de broŝuroj (Konstitucio de Ĉeĥoslovaka Respubliko, 1948, Lerneja reformo en Ĉeĥoslovakio, 1949, 1950, Ĉeĥoslovakio en nombroj 1959, 1962, Agadprogramo de KPCĈ, 1968) kaj tradukinto de kelkaj alilingvaj rakontoj. Li lingve kunlaboris ĉe "Praha-Gvidlibro", 1957, "E-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta vortaro" (R. Hromada, 1961) kaj "Atlaso de la Mondo", Praha 1970.

La rememoron pri la neforgesebla samideano Jaroslav Mařík ni kunligu kun la firma decido labori por la afero de Esperanto same intense kaj same malavare kiel li.

*Prof. RNDr. Vlastimil Novobilský, CSc.*

The screenshot shows the homepage of 'TERGLOBO' (CĤHA INTERRETA E-KLUBO). At the top, there is a navigation bar with 'Uĉebnice', 'Internetový klub', and 'Diskusní fórum'. A large banner reads 'Bonvenon!' (Welcome!). To the left is a vertical menu with items like 'Hlavní stránka', 'Historie', 'Kultura', 'Instituce', 'Esperanto v ČR', 'Zajímavosti', and 'Odkazy'. Below the menu is a 'OOOS IS' logo and a 'Píšte nám' (Write to us) button. The main content area contains a welcome message in Esperanto and a list of links under 'Pro začátečníky' (For beginners) and 'Por esperantistoj' (For Esperantists). On the right, there is a flag of the Czech Republic and logos for 'Gangalo' and 'espér-nto Programa'.

## Interreta klubo de junaj esperantistoj Terglobo

Supre vi vidas interretan portalon de junulara Esperanto-klubo Terglobo, pli precize ĝian titolan (eniran) paĝon, kiel ĝi aperas sur la ekrano de komputilo.

La klubon fondis 21-jara studento de juro kaj sociologio Tomáš Břicháček. Li kompletigis ĝin per propra lernolibro kaj per diskutejo. Ne mankas ligoj al plej gravaj paĝoj de nia movado. Interese verkita estas la enkonduka bonvenigo. Nun la klubo havas tri membrojn, sed espereble ilia nombro kreskos.

Ŝajnas, ke tia estos la futuro de nia movado. Nuntempaj junaj homoj ne volas viziti klubejon kaj tie babili internacilingve. Cetere, ankaŭ la angla ne havas klubojn, nek ekzemple la latina. Aliaj junularaj kluboj havas lud-aŭtomatojn aŭ komputilojn aŭ ili estas dancejoj kun brua rok-muziko, alkoholo, drogoj kaj lasera lumspektaklo.

Multaj geknaboj sidas hejme ĉe komputiloj kaj serĉas interesaĵojn en la interreto. Tial gravas, ke nia propono estu kiom eble plej riĉa.



Miloslav Šváček metas florojn sur  
la tombon de la esperantista  
verkisto Karolo Pič

Miroslav Malovec en la konferenca  
libroservo





## Eli Urbanová en televido

Lunde la 10-an de novembro 2003 en la programo Granda Ĉaro oni parolis pri cigana lingvo, Esperanto kaj komputila slango. Sub titolo *Fino de erotika poetino* oni prezentis nian Eli Urbanová en ŝia loĝejo. La interparolo kaj deklamado de versoj estis riĉigitaj per malnova dokumenta filmo pri infana Esperanto-klubo, kiun la poetino gvidis antaŭ kelkdek jaroj.

## Esperanto ne estas por pragmatuloj

Sub tiu titolo aperis (13.11.2003) en la praga gazeto Metro intervjuo kun juna esperantisto Tomáš Břicháček, kiu startigis en interreto junularan klubon Terglobo.

## Pastorela

estis Adventa meditado en la ĉeĥa kaj Esperanto la 9-an de decembro 2003 en Galerio de Vojo al la Lumo. La versojn de Věra Ludíková legis pluraj personoj, en Esperanto Josef Vich.

## Kindsoldaat

aŭ *Infanosoldato* estas poemo de 12-jara nederlandanino Dominique Brinkman dediĉita al kruela sorto de ugandaj infanoj forŝtelitaj el hejmo kaj devigataj murdi kiel krimuloj.

La poemeto aperis libroforme kun tradukoj al 25 lingvoj inkluzive de Esperanto kaj la ĉeĥa.

## 26-a ĈEP

Ĉebalta Esperantista Printempo okazos en la pola Mielno en la tagoj 15. 06. - 23.06. 2004. La programo antaŭvidas prelegojn kun video-filmoj, konkursojn kun premioj, kantadon, dancadon, ekskursojn kaj lingvoperfektigadon.

## Konferenca stampo



17. - 19. Ĥuno 2003

9. KONFERENCE  
ČESKÉHO  
ESPERANTSKÉHO  
SVAZU  
LITOMYŠL

## Infanoj el Okříšky

preparis ekspozicion de siaj korespondajoj en Esperanto. En gazeto Vysočina aperis pluraj artikoloj pri ilia laboro sub titoloj *Ekspozicio de leteroj* (28.8.2003), *Esperanto prizorgis por infanoj el Okříšky amikojn el Francio kaj aliaj landoj* (1.9.2003), *Esperanto laŭdire kompletigas la anglan* (3. 9. 2003), *Instruado de Esperanto povas alporti multajn amikecojn.*

## Internacia Esperanto-Muzeo translokiĝos

Spite gazetajn raportojn pri la malo, la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno fartas bone kaj kreskas. Ĉiujare la muzeo plenumas informetojn de 2.000 personoj el la tuta mondo. Jam ĉiuj libroj de la muzeo estas enkomputiligitaj kaj troveblaj en la datenbanko Trovanto. Nun oni enkomputiligas la gazetojn. Post kelkaj jaroj la muzeo ankaŭ ricevos novan oportunan ejon.

"Nia pozicio en la Nacia Biblioteko estas forta. Internacia Esperanto-Muzeo neniam antaŭe tiom bone fartis. Ni plene povas plenumi ĉiujn niajn taskojn bibliotekajn kaj krome pere de la Muzeo informi en unu jaro proksimume 2.000 personojn el la tuta mondo en tre detala maniero pri Esperanto, farante tiel grandan servon al la Esperanto-movado," diras la direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, Herbert Mayer.

Li refutas raportojn aperintajn antaŭ la somero en la E-gazetaro, ke la muzeo estas endanĝerigita. En la julia statistiko pri la specialaj interretaj serĉiloj de la Aŭstria Nacia Biblioteko, Trovanto estis je la unua fojo en la unua loko, konsultita

1078-foje. En junio Trovanto estis la malplej uzata de la kvar retserĉiloj. La kresko povas esti rezulto de alvoko lanĉita de la muzeo.

IEM havas plian bonan novaĵon:

"Estas nun definitive decidite, ke Internacia Esperanto-Muzeo translokiĝos. Tio okazos verŝajne en 2006 aŭ 2007," diras Mayer.

"Ni ne plu sidos en la kaŝita netrovebla grimpiga subtegmentejo, sed teretaĝe en Herrengasse, apud la Ministerio por Internaj Aferoj, do nur 200 metrojn for de la nuna loko.

Dank' al la translokiĝo la instituto baldaŭ staros sur pli firmaj piedoj. Post la gajno de tria laborposteno - ĝis 1995 laboris nur du en la Muzeo, nun ankaŭ la eksteraj cirkonstancoj definitive pliboniĝas je nivelo de moderna muzea teknologio.

- La ejoj ne estos grandaj, sed ĝuste novaj rimedoj ebligas al ni transdoni nian mesaĝon al la publiko multe pli adekvate ol nun en la malnovaj ejoj. Kaj kompreneble ankaŭ estos tute nova muzeo-koncepto," ĝojas Mayer.

En sia pli ol 70-jara ekzisto la biblioteko de IEM en Vieno daŭre ampleksiĝis kaj estas hodiaŭ la plej granda kolektaĵo pri Esperanto kaj interlingvistiko.

*Dafydd ap Fergus*

## Kronach

De la 3-a ĝis la 5-a de oktobro 2003 okazis la aŭtuna kunveno de la Bavara Esperanto-Ligo en Kronach, kiu ĉi-jare festas 1000-jaran datrevenon de la unua mencio de Kronach en la historio.

Vendrede oni diskutis pri la stato kaj plua evoluigado de la Bavara E-Ligo.

Sabate en la historia urbodomo en ĉeesto de la urbestro Manfred Raum okazis salutado de la partoprenantoj kaj ties respondoj. En la nomo de la ĉeestantaj ĉeĥoj (inĝ. P. Chrdle, inĝ. J. Kříž, V. Novobilská, M. Smyčka) parolis prof. D-ro V. Novobilský. Sekvis esperantlingva filmo "1000-jara Kronach, historio kaj nuntempo". Posttagmeze BELO-kunveno balotis sekretarion, kaj estis prezentitaj raportoj pri la situacio de Esperanto en Ĉeĥio kaj Bavario kaj pri eblecoj de reciproka kunlaboro. Sekvis rondirado tra la historia parto de Kronach.

Dum la solena vespera programo en la historia urbodomo estis prezentitaj du prelegoj: "Frankoj kaj slavoj en la regiono de Kronach ĉirkaŭ la jaro 1003" de Armin Grötzer kaj "Aktuala kunlaboro inter la Ĉeĥa respubliko kaj Saksio surkampe de la medioprotektado" de inĝ. Josef Kříž el Ústí n. L. La muzikan kadron prizorgis Miroslav Smyčka (kantado) akompanata de loka pianisto (V. Novobilský ne povis pianludi pro man-vundiĝo). Dimanĉe oni rondiris tra la fortreso "Rozomonto" (la plej granda sur la teritorio de Germanio).

La aranĝo estis impona, organize bonege ĝin reĝisoris prezidanto de la loka klubo Armin Grötzer. Mankis nur pli mult-nombra publiko.

-van-

## Eŭropa Bunto

Sub tiu titolo okazos la 9-an de majo 2004 en Strasburgo (Francio) apud la Eŭropa Parlamentejo kaj Eŭropa Konsil-ejo manifestacio de esperantistoj por la rajtoj de ĉiuj Eŭropaj lingvoj, por ke la komunikado ne limiĝu nur al la tri la plej potencaj idiomoj.

## TEC renovigas sian agadon

Lucas Yassumura, 34 jara esperantisto el urbo Jundiaí [jun-dja-ji], ŝtato Sao Paulo, Brazilo restartigis en la interreto la agadon de Terminologia Esperanto-Centro, por kiu li preparis belan paĝon [www.terminologio.subito.cc](http://www.terminologio.subito.cc).

## KRISTANA KONGRESO

(54-a kongreso de KELI)

okazos en la tagoj 31. 7.- 7. 8. 2004 en ĉarma moravia urbeto Bystřice pod Hostýnem. Pliajn informojn:

Pavel Polnický, Lesní 150/VI., 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

## Projektoj finance subtenotaj de UEA

UEA finance subtenas projektojn, kies celoj estas pligrandigi nombron da Esperanto-parolantojn, eldoni konkretajn verkojn ktp. La petanta organizo devas pruvigi, ke ĝi kapablas plenumi la projekton, mem finance partoprenas ĝin kaj redonos la monon en la kazo de malsukceso.



## Ĉeĥaj infanoj en Italio

De la 30-a de aŭgusto ĝis la 6-a de septembro 2003 el preĝejo de sanktaj Johano kaj Paŭlo en Rimini al barilo pendis koloraj rubandoj, antaŭ la preĝejo svingis flagoj de 17 landoj kaj supre sur paroĥa domo estis Esperanta flago kaj granda surskribo: 16-a Ekumena Esperanto-Kongreso 30.8.-6.9.2003 en Rimini.

Tiun ĉi kongreson kaj komune pasantan JET (Junulara Esperanto-Tendaro) ĉeestis ĉirkaŭ 300 homoj. Mi veturis kun grupeto de 14 E-infanoj travivi belajn tagojn en JET.

Ĝistagmeze estis kursoj de Esperanto, posttagmeze ni trarigardis historiajn partojn de la urbo, promenis, banis nin en la maro, vizitis delfenejon. Al programo por ĉiuj apartenis ankaŭ duontaga ekskurso en San Marino kaj tuttaga ekskurso al urbo konata per mozaikoj, al Ravena.

Post reveturo el San Marino je la 9-a vespere infanoj prezentis sin per fabelo, pantomimo, flaŭta ludo, dancoj, kutimoj kaj kantoj al civitanoj de Rimini en Casa Colonica. Al la vizitantoj de kongreso prezentis sin infanoj post reveturo el Ravena per flutludo kaj fabeloj. Dum lasta adiaŭa vespero dancis knabinoj poemon "Antaŭkristnaska tago". Por ekzercado de programo

mankis al ni ne nur tempo, sed precipe loko. Mi devas laŭdi la infanojn. Ili estis el diversaj lokoj kaj neniam antaŭe dancis kune. Provi dancojn ili povis nur en mallarĝa koridoro de la kvara etaĝo. Malgraŭ tio ili sukcesis.

Zdenka Novotná

## Du libroj tradukitaj el Esperanto en la ĉeĥan

Eldonejo Eko-konzult eldonas slovak- kaj ĉeĥlingvajn librojn pri spiritaj, kuracistaj kaj okultismaj temoj. Ĉijare ĝi eldonis du librojn, en kiuj oni povas legi *Přeloženo z esperanta* (Tradukite el Esperanto). La libro *Ve stínu a ve světle* (En ombro kaj en lumo) estas romano laŭdire diktita al mediumo de spirito de Victor Hugo. Tradukisto anonima. La alia *Poslední východ slunce. Vyhoštění z planety Capella* (La lasta eliro, Ekzilo el la planedo Capella) estas du libroj en unu volumo (tradukitaj de N. Sládeček kaj H. Stavělová) pri danĝero minacanta la Teron el la kosmo. Bedaŭrinde la publikaĵoj ne estis lingve korektitaj (la gramatikaj eraroj kaj precipe stilaj mallertaĵoj estas videblaj).

## RIMINI

### LA TRIAN FOJON

Jam la trian fojon esperantistoj havis eblecon kongresi en la itala ĉemara urbo Rimini. Okazis tie (30.8-6.9. 2003) la 16-a Ekumena E-Kongreso (56-a de IKUE kaj 53-a de KELI). Partoprenis ĝin entute ĉ. 250 personoj (el Ĉeĥio 46). Niaj busveturantoj ne havis agrablan vojaĝon, ĉar en Italio pro torenta pluvo deŝutiĝis deklivo sur la ŝoseon kaj ĉiuj aŭtoj veturis malrapide per 30-kilometra rapideco tra Slovenio.

Dimanĉe post apartaj Diservoj ortodoksa, evangeliana, katolika kaj ekumena okazis je la 17-a horo inaŭguro de la kongreso en salono de Emile Peltier. Ĉeestis ankaŭ la episkopo de Rimini, prezentinta salutleteron de Itala Episkopara Konferenco. Vespere koncertis Anna Laszay (Anjo Amika).

Dum la kongresaj tagoj realiĝis multaj programoj, ofte eĉ du samtempe, paralele, inter kiuj mankis libera tempo por banado en la maro, ripozo ktp. La gejunuloj kompreneble havis siajn proprajn programojn.

Lunde Miloslav Šváček prezentis la kongresan temon per prelego: "*Vi estas miaj atestantoj, salo kaj lumo por la mondo*". Posttagmeze pastro Duilio Magnani erudicie klarigis

ĉiujn detalaĵojn de mozaikoj kun italaj-Esperantaj surskriboj en la preĝejo de sanktaj Johano kaj Paŭlo. Sekvis prelego de Mons. Giovanni Balconi: "*Ravenna, Ekumena Renkontejo de Oriento kaj Okcidento*".

Marde post Sankta Meso laŭ grek-katolika rito okazis kelkaj prelegoj kaj posttagmeze ekskurso al San Marino. Post la reveno grupo de ĉeĥaj gejunuloj prezentis en Riminian programon al itala publiko.

Merkrede la kongresanoj vizitis Ravennan, urbon kun multaj antikvaj preĝejoj. Eĉ tuttaga laciĝo ne malhelpis okazigon de gaja vespero en salono de Emile Peltier.

Ĵaŭda tago estis dediĉita al Asembleoj de IKUE kaj KELI. Dum la IKUE-Asembleo oni balote elektis IKUE-Estraron por kvarjara balotperiodo. Kiel Prezidanton - nian Miloslav Šváček.

Vendrede realiĝis diverstemaj prelegoj kaj programeroj, vespere gaja bunta programo de la kongresanoj.

Sabate post Sankta Meso okazis je la 9-a horo oficiala fermo de la kongreso sub gvido de nova IKUE-prezidanto Miloslav Šváček. Poste sekvis jam adiaŭo kaj senproblema reveno hejmen.

*Laŭ Dio Benu*

## Kongresa temo en Rimini

En sia inaŭgura parolo (plena teksto en *Dio Benu*) M. Šváček parolis pri persekutado de atestantoj de Kristo dum periodoj de faŝismo en Germanio kaj de komunismo en Sovetunio kaj poste speciale en Ĉeĥoslovakio, kiun li travivis proprahaŭte. Dum la kvindekaj jaroj la ŝtatpotenculoj tute likvidis la Grek-katolikan Eklezion kaj planis la samon kun la Rom-katolika. Du mil ordenanoj elpelitaj el klostroj, politikaj procezoj kun pastroj, likvido de sporta asocio Aglo, kontrolado, kiu vizitas preĝejon. Juna Šváček kiel kredanto ne rajtis studi, li povis elekti nur inter terkulturado, minado, masonado.

En 1968 venis politikaj ŝanĝoj, sed la provon reformi nereformeblan sistemon sufokis tankoj de Varsovia Pakto kaj la t.n. Normaligo. Tamen en 1969 fondiĝis ĈEA kaj ĝia IKUE-sekcio, kiu en vilaĝo Herbor-tice okazigis katolikajn tendarojn sub oficiala nomo Libertempa E-Tendaro. Ĝa 9-an tendaron en 1977 partoprenis rekorda nombro 130 precipe gejunuloj. Antaŭ oficiala vekigo estis en la tendara fendego celebra Esperantlingva Sankta Meso (laŭ tiamaj leĝoj Diservo ekster preĝejo estis granda krimo). Venis Ŝtata Polico kaj forkondukis M. Šváček, kulpigante lin pro

mescelebroj en la tendaro, due pro religiaj preĝado, kantado kaj diskutado, trie pro kruco el betulaj branĉetoj alnajlita sur arbotrunko. Du jarojn oni bezonis por prepari juĝadon, sed ankaŭ kreskis premo de eksterlanda solidareco, kiu rezultigis 18-monatan kondiĉitan punon. Post falo de Fera Kurteno invadis nian landon kun demokratio ankaŭ terura senmoraleco, senbrida krimeco, senlaboreco, trompado de reklamoj ktp. Religio (32%) estas triona ekz. kompare kun Kroatio. Tial IKUE-anoj vidas sian ĉefan taskon en misia evangelizado, reveno al Kristo.

## Iniciato de nia IKUE-sekcio

Katolika sekcio de ĈEA ellaboris ampleksan kontribuon por Asembleo de Katolika Eklezio en Ĉeĥio kiel plibonigi la laboron de katolikoj en ĉiuj sferoj de la vivo. Unu ĉapitro estas dediĉita al Esperanto, rimedo por ligi internacian kunlaboron en la Eklezio kaj amikajn ekumenajn rilatojn kun la ceteraj kristanoj. La sekcio proponas kursojn kaj atentigas, ke Esperanto estis akceptita kiel liturgia lingvo, elsendas en ĝi la Vatikana radio, la papo uzas ĝin en siaj alparoloj *Urbi et Orbi* kaj la katolikan Esperanto-movadon benis ĉiuj papoj de la 20-a jarcento.



## Ĉirkaŭ Eŭropo

Jam tio estas pli ol ses jarojn, kiam junaj francoj Gudule kaj Laurent Cuenot decidis piede trairi la tutan Eŭropon. Ilia filino Lola estis unujara knabineto, do ili por la vojo havis ses jarojn, kiam Lola ankoraŭ ne estis asidua al la lernejo.

Dum tiu ĉi tempo ili sukcese trapasis la tutan Eŭropon el Francio tra Svedio ĝis Grekio kaj Italio. Kompreneble ke ne estis eble



preterpasi la koron de Eŭropo, Ĉeĥion. En nia lando ili restis pli da monatoj dum vintro. Tiam jam

trijara Lola vizitadis infanĝardenon kaj komencis sufiĉe bone paroli ĉeĥe. La gepatroj utiligis tempon kaj geedziĝis en la urbo Fulnek. La edziĝofesto okazis en belegaj popol-kostumoj de moravia regiono Valaĥio, kies koloroj simbole reprezentis la francan flagon.

Kvankam ili ilustre demonstris, kiel malmulte da aĵoj homoj por feliĉa vivo bezonas, almenaŭ bazan ekipaĵon helpis tiri la jam neĵuna ĉevalino Kamila. Ĝi fidele helpadis dum la tuta vojo, tamen Laurent devis trifoje tute nove rekonstrui domveturilon, ĉiam pli malpezan. La lasta jam rememorigis malgrandan ĉareton de ciganoj, sed por rumanaj montaroj ĝi estis plej taŭga. Kiam en Grekio naskiĝis la knabeto, la ĉareto devis esti plilongigita je unu metro.

Ne nur ĉevalino, sed ankaŭ Esperanto fidele servis dum la tuta vojo. Ĝi estis ne nur rimedo por komunikado kun esperantistoj el diversaj landoj, sed ankaŭ lingvo, per kiu parolis patro kun malgranda Lola. Ĉiuj travivaĵoj estis pri-skribataj esperantlingve en speciala bulteno, kiun regule ricevadis esperantistoj el multaj landoj. Almenaŭ en la menso ili povis esti kun la familio kaj admiri kuraĝon kaj belegajn travivaĵojn.

Post ses jaroj la familio revenis hejmen en Bretonion kaj solene finis la vojon per la granda festo, kiu okazis ĉi-julie en la tipa franca bieno. Venis ne nur esperantistoj el la tuta Eŭropo, sed ankaŭ nomadoj kun ĉevaloj kaj koloraj domveturiloj. Ĉie regis ĝojo kaj amuzo, ĉeestantoj havis eblecon vidi dokumentojn el la vojo, aŭskulti belan muzikon kaj gustumi bonegajn francajn manĝaĵojn kaj vinon. La lasta parto de vojo kaj fina festo estis ankaŭ filmitaj per televido, do ni povas atendi interesan dokumenton.

Sed la plej grava afero estas, ke la vojo ĉirkaŭ Eŭropo denove pruvis, ke kie aperos amikeco kaj interkompreniĝo, Esperanto ne povas manki.

*Jiří Caletka*

*Foto: Familio Cuenot survoje*

## Osm let na cestách po naší planetě

Aliaj famaj esperantistaj vojaĝantoj, Maryvonne kaj Bruno Robineau, priskribis siajn travivaĵojn en la libro **Ili vivis sur la tero. Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo** (Opera-eldonejo 1998). La libro nun

aperas en la ĉeĥa traduko de Jindřiška Drahotová (sub titolo, kiun ni uzis por nia artikolo) en la eldonejo Volvox Globator, kiu prizorgis aŭtorajn rajtojn kaj lingvan kontrolon de la ĉeĥa teksto. La libro kun brilanta malhele blua koverto estos aĉetebla en librovendejoj, la eldonejo ĝin proponas ankaŭ en la interreto ([www.volvox.cz](http://www.volvox.cz)), la prezo estas 200 Kč. Ni gratulas.

S-ino Drahotová jam preparas aliajn tradukojn por la eldonejo kaj serĉas kontrolantojn, kiuj kapablos kompari la tradukon kun la originalo. Ŝia antaŭa traduko **Evropou a Asii na kole a s esperantem** (1999) estas jam elĉerpita.



Karaj geamikoj, partopreninte la ĉijaran Universalan Kongreson de UEA en Götensburgo, mi emas interdividi kun vi miajn impresojn. Mi veturis per karavano de KAVA-PECH. Nia grupo kolektiĝis sabate la 26-an de julio en la praga flughaveno. Inter ni estis ankaŭ kvar eksterlandanoj: du esperantistoj el Slovakio kaj du el Germanio. Ni forflugis ĉirkaŭ tagmezo el Prago kaj post iom pli ol unu horo ni alteriĝis en Kopenhago. De tie ni estis tuj forflugontaj al Götensburgo. Sed ĉar la unua aviadilo malfruiĝis, en Kopenhago ni ne atingis nian duan aviadilon. Do ni veturis per moderna, pura skandinavia trajno el la flughavena komplekso ĝis Götensburgo.

Ĝi estis por mi interesa, ĉar la tutan vojaĝetapon ni veturis sur reloj, do ne per ŝipo. Tamen post kelkaj minutoj ni subite troviĝis en la sveda stacio Malmö. Ni veturis parte trans nova ponto kaj parte tra tunelo. Poste ni kelkfoje veturis laŭ la marbordo. Ni vidis interesan pejzaĝon kaj multajn vento-elektrejojn. Fine ni feliĉe atingis Götensburgon. Post nelonga piediro ni atingis la kongresejon proksimume je la naŭa vespere. De tie gvidis nin deĵorantino al nia tranoktejo – studenta hejmo, kiu troviĝas en duonhora distanco de la kongresejo. Dimanĉe la 27-an de julio ni sukcesis registriĝi. La tempa plano de la kongreso estis iom ŝanĝita, la inaŭguro okazis nur lunde je la deka. Poste ni partoprenis la buntan interesan kongresan programon.

Mi renkontis multajn miajn geamikojn. La merkredo estis – kiel kutime – la „ekskursa tago“. Mi preferis ekskursi

private: mi trarigardis la belan urbon Götensburgon kun speciala intereso pri la maro kaj la haveno. Malantaŭ la urbo mi trovis eĉ taŭgan strandeton, kie mi ripozis kaj naĝis en la maro. La vetero daŭre estis suna kaj tro varma, la marakvo havis konvenan temperaturon por banado. Ĝi agrable refreŝiĝis min.

Post la fino de la UK – sabate la 2-an de aŭgusto nia karavano veturis per taksioj al la Götensburga flughaveno. De tie ni flugis al Danujo – en Kopenhagon. En tiu ĉi metropolo ni restis tri tagojn. Gvidis nin ofte la lokaj esperantistoj. La loka E-klubo eĉ solene akceptis nin kaj regalis nin per vespermanĝo en siaj ejoj. La ĉiĉeronoj emis multon montri al ni, sed mi pro troa sunbrilado kaj varmego eĉ malsaniĝis.

Ĉifoje mi menciis ankaŭ mian „teknikan“ obstaklon dum la flugo Götensburgo –Kopenhago, kiam ĉe mia problemo (kiu finiĝis bone) multe helpis al mi s-ano Petro Chrdle kun kelkaj s-anoj, al kiuj mi multe dankas.

En Kopenhago ni komune promenveturis boate tra kaj ĉirkaŭ la urbo. Ni vidis tie i.a. la faman statuon pri la Mara Feineto. Poste ĝuante iom da libera tempo mi piediris al tiu ĉi loko. Oni povas tuŝi la statuon nur starante en la maro. Rigardante la statuon mi rememoris la kortuŝan Andersen-fabelon.

En Danujo ni ankaŭ vizitis pitoreskan historian urbon Roskilde kun vikinga muzeo kaj maro.

*Jirí Rada*





## STUDOJ EN POZNAŬ

ĉefredaktoro de gazeto **STARTO** petis min dividi kun vi mian sperton rilate la studadon en Universitato Adam Mickiewicz (UAM) Poznań.

En la dua plej granda pola universitata urbo studas ĉirkaŭ 90 mil studentoj. Ekde la jaro 1998 eblas profundigi konojn en lingvistiko, studi en internacia lingvo Esperanto kaj ĝui internacian etoson. Temas pri fako interlingvistiko. Ni estis la unua grupo, kiun formis gesamideanoj el Germanio, Svedio, Usono, Makedonio, Pollando, Ĉeĥio. Jes, mi estis ununura studentino el Ĉeĥio. Ankaŭ prelegintoj venadis diversnaciaj. Ĉiujn kunligis precipe intereso, deziro studi la fakon profunde, konatiĝi ankaŭ kun aktualaĵoj en la movado ktp. Se oni decidas fari la paŝon, do ekstudi, oni ne pensu pri mono aŭ tempo. Oni ĝuu la eblecon kaj ĝoju pro la rezulto.

Unusemajna studsesio okazadas regule dufoje dum la jaro: fine de septembro kaj fine de januaro / komence de februaro. Oni faras, plenumas ekzamenojn kaj poste aŭskultas prelegojn. La studentoj havas eblecon demandi, reagi, prezenti propran opinion. El ĉiuj 4 fakoj dum unu semestro oni devas skribi disertaĵon kaj plenumi ankaŭ skriban kaj buŝan

ekzamenon. Dum la lasta jaro oni havas ses monatojn por kompili, verki la plej gravan, ĉefan skriban laboraĵon – diploman. Kiam oni plenumas ĉiujn taskojn, defendas la diplomlaboraĵon, do fine oni diplom-iĝas.

Ĉiutaga programo daŭras kutime ekde la 9-a horo ĝis la 12-a horo, posttagmeze oni daŭrigas ekde la 14,30 ĝis la 18,30 horo. Vespere oni organizas kulturalan distraĵon, ĉar ne nur sciencajn interesojn havas ni studentoj. Ĉu vi konsentas? Aŭ vi eventuale havas aliajn opiniojn, spertojn?

Por ni ĉiuj iĝis kutimo unufoje vespere veturi al fora urbo-parto kaj viziti familion en bela domo, kie ĉiuj anoj parolas Esperante: pola patro, patrino el Thaiwan, filo, kiu uzas kaj la polan kaj Esperanton, pianludas kaj bele kantas. Ili invitis nin ĉiujn kune vespermanĝi manĝaĵon preparitan laŭ ĉina maniero. Ĝi estis ĉiam vere bongusta kaj abunda. Poste ni kantis, aŭskultis spritaĵojn, rakontojn, ni ĝuis la societon. Ankaŭ dum la studado oni povas ĝoji.

Nun mi rigardas malantaŭen kaj venas al konkludo, ke vere valoras aliĝi kaj studi en UAM Poznań.

*Jitka Skalická*

## Rakonteto pri la plej gaja koloro

Foje panjo kun Daĉjo parolis pri tio, ke ĉiu devas havi en la mondo iun, kun kiu li sentas sin tre bone, kiun li ŝatas vidi, kun kiu li ŝatas travivi liberan tempon. Tiu povas esti panjo, paĉjo, geavoj aŭ kamarado, ne tiom estas grave, kiu li estas. Plej grave estas, ke pro tio, ke ni ŝatas ilin, ni volas per io ĝojigi ilin.

Tiun bildeton por ĝojo oni devas pentri per plej gaja koloro, opiniis Daĉjo. Sur bretmeblo en tinetaj fieris diversaj farboj. Daĉjo observis ilin, poste li elektis la flavan. Ĝi estas kiel la suneto, li meditis, pro tio ĝi certe estos el ĉiuj farboj la plej gaja. Li kuraĝe komencis pentri la bildeton. Sed kio sekvis? Daĉjo subite prenis ankaŭ la ruĝan kaj poste aliajn farbojn. Ni rigardu, ja ankaŭ ruĝa floro certe ĝojigos. Kaj kiel bele sur brunaj bedoj aspektas diverskoloraj floretoj! Kaj ĉu impresus nin gaje, kiam ni ne havus verdan herbejon por nia petolado? Se mankus ankaŭ blua rivero kaj rivereto?

Ĉu vi pensas, ke Daĉjo la plej gajan koloron ne trovis? Ĝuste male. Li ekkonis, ke ĝojo estas riĉkolora kiel bunta bukedo, ke ĉiu koloro havas sian ĉarmon, kaj li povas en

sia fantazio krei vere malgrandan artan verketon. La bildeto de Daĉjo estiĝis por tio la plej ekzempla pruvo.

Kaj pro tio, ke ĝi estis el ĝojo, ĝi certe ĝojon ankaŭ alportos.

*Blanka Štráchalová  
por vivjubileo  
de Jana Holcová,  
kiu ĝin esperantigis.*

## Belartaj Konkursoj 2003

**Infanlibro de la jaro:** nealjuĝita.

**Kanto:** la unuan kaj du duajn premiojn akiris Nargis Mondjazib el Usono.

**Poezio:** 1. Ne plu; 2. Plu kaj Plu (ambaŭ Anja Karkiainen, Finnlando); 3. Tra l' aero (Christian Riviere, Francio).

**Teatraĵo:** 1. Samhufo kaj la morto (Jorge Teles, Brazilo); 2. Trombo (Stefan MacGill, Hungario).

**Eseo:** 1. (premio Luigi Minnaja) La kvara periodo en Esperanta literaturo (Jukka Pietilainen, Finnlando); 2. La pluralo (Cristian Riviere, Francio); 3. La tri doktoroj (Paulo Sergio Viana, Brazilo);

**Prozo:** 1. La kernproblemo de doktoro Plutonio (Martin Weichert, Svedio); 2. Go-ludo (Christian Riviere, Francio); 3. Aŭtobuse (Sten Johansson, Svedio).

**Vidbendo:** 1. Esperanto en Maklenburgio -Antaŭpomerio (Ralf Kuse); la honora mencio al Odesa Junulara Esperanto-Klubo Verdaĵo pro filmo Perlo de Ĉenigramarujo.

## Lingvaj ludoj kaj enigmoj (15)

Solvoj de la enigmoj el la antaŭa numero:

27. mondo - mono

28. per diamanto - perdis amanto

Eble vi konas la instruan lingvan konkurson: formi el unu vorto kiom eble plej multe da novaj vortoj, uzante ĝiajn literojn (ĉiun literon oni povas uzi kelkfoje). Ekzemple: HONESTA - estas, nesto, stano, haste, neta, sono, sen, atente, en, sana, sata, ho, sen, teno, taso, testo,

...

En la enigmo nomata

### CIFERKAŜO

la literoj de la divenotaj fundamenta kaj nove kreitaj vortoj estas anstataŭitaj per ciferoj. La formo povas esti listo de ciferoj kun la difinoj. En la kontinua teksto aŭ rimajo la divenotaj vortoj apartenas pli malpli al la sama temo.

Montraĵoj:

1232 Konstruaĵo Solvo: domo

452 jareco aĝo \*

436 ŝati ami

23452 honor-rekono omaĝo

3212 furoro modo

123456 MALUTILI DOMAĜI

21 studo de 3245 ĉe 12345 petrola okuloj protestas.

Por lumo ne 4212 elektra 234515 pli taŭga estas.

Solvo: al, mapo, LAMPO, pala, ampolo.

Kaj nun solvu vi mem:

29. 14562 percepti  
1237 deponejo por greno  
34567 legumenaĵo  
6737 teksaĵo  
752 ĝenerala pronomo  
64562 logi  
7347 grasa likvaĵo  
1437 sidaĵo sur ĉevalo  
1234567 SENSONO

30. En urba 12346 plu 3652 lin tedas,  
lin kaptas deziro kaj 1636 spontana:  
nun 1212 en 1434 **123456**  
naskiĝa  
samkiel antaŭe en 456 infana.

*Josef Cink*





## Ni kondolencas

- La 25-an de aŭgusto 2003 mortis en la aĝo de 77 jaroj eminenta esperantisto, tradukinto de multaj kantoj en Esperanton (la plej fama estas "Mariŝa, kisu min") kaj fondinto de Junularo Ostrava (50-aj jaroj)

### Ladislav Kyselý.

- La 25-an de aŭgusto mortis pastro **Josef Čihák** en aĝo 91 jaroj, kunlaboranto de fratoj Filip ĉe ilia vortaro.

- En Liberec forpasis multjara esperantisto **Rudolf Jiří Zvěřina** (la 28-an de aŭgusto 2003). Li komencis lerni Esperanton en Karlovy Vary kaj poste li vivis kelkajn jarojn en Hradec Králové. Antaŭ 40 jaroj li transloĝiĝis al Liberec. Dum multaj jaroj li eldonadis Internacian Korrespondan Adresaron Esperantistan kaj estis ankaŭ membro de KELI. En s-ro Zvěřina ni perdas viglan kaj bonegan esperantiston, kiu faris multe por disvastigi nian lingvon Esperanton.

## Miroslav Malovec - 50

La redaktoro de nia Starto festas sian jubileon la 8-an de decembro. Li esperantistiĝis en 1968, membriĝis al ĈEA en 1972. En 1977 li komencis instrui en SET Lančov, poste sekvis lektorado de korespondaj kursoj kaj ekzamenado de gramatiko en la ekzamena komisiono de ĈEA. Por ekzamenotoj li publikigis koncizan *Gramatikon de Esperanto* (1988). Kun Zdeněk Rusín li tradukis romanon de F. Kožík pri Komenio *Lumo en tenebroj* (1992), kun Jiří Patera rakontojn de J. Hašek *Ne nur soldato Švejk* (1994), kunlaboris ĉe novaj vortaroj por la publiko (Kraft-Malovec: *Esperanta-ĉeĥa*

*vortaro*, 1995, Kraft: *Ĉeĥa-Esperanta vortaro*, 1998) kaj ĉe broŝuro de fundamentoj de la ĉeĥa lingvo por eksterlandaj esperantistoj (Chrdlová-Malovec: *Baza ĉeĥa konversacio*, 1996), kiu estis tradukita ankaŭ en la anglan, germanan, francan, italan kaj rusan lingvojn. El Esperanto en la ĉeĥan li tradukis kun Václav Pecák filozofian verkon de Bruno Vogelmann *Nova realismo* (1996). La menciitajn publikaĵojn eldonis la firmao KAVA-PECH en Dobřichovice, kun kiu M. Malovec kunlaboras redaktore ankaŭ ĉe preparo de publikaĵoj de aliaj aŭtoroj kaj tradukistoj (ekz. *Milito kontraŭ Salamandroj*, *Propra biografio de Karolo IVa*, *Aŭdienco*, *Bandenlanda legendaro*, *La Besto de Vakareso*). Kun Jaroslav Mráz li tradukis kaj redaktis libron de Věra Ludíková *Ekaŭdi la animon* (1998), preparis por publikigo aliajn tradukojn de Jaroslav Mráz (el verkoj de V. Ludíková, Z. Bergrová kaj J. Karen). Nun li ĉeĥigis esperantlingvan broŝuron de Detlev Blanke pri interlingvistiko. Gravan parton de lia laboro konsistigas enkomputiligado de manuskriptoj (post Josef Vondroušek kaj Miloš Lukáš kaj de aliaj esperantistoj), interalie li enkomputiligis teknikan vortaron de la iama scienc-teknika sekcio. Pro arkivaj celoj ankaŭ malnovajn esperant-lingvajn publikaĵojn. En la interreto li kontribuas al enciklopedio Vikipedio, preparis paĝojn por Starto kaj Dio Benu, paĝon de ĉeĥaj Esperantoverkistoj kaj de faka literaturo. Plie li laboras en la kluba komitato de Brno, en la pedagogia kaj ekzamena komisionoj, en la sekcio de informadiko.

*Komitato de ĈEA*

## KALENDARO 2003

24.-28.11. Internacia kurso de Esperanto en Dobřichovice

28.-30.11. Paroliga kurso en Dobřichovice

6.12. La 23-a Ĉeĥa-Saksa Tago Ústí n.L.

9.12. Pastorela de Věra Ludíková

## KALENDARO 2004

31.7.-7.8. 54-a kongreso de KELI Bystřice pod Hostýnem

somero: SET Lančov

aŭtuno: Konferenco de ĈEA

decembro: 100 jaroj de J. Vondroušek kaj

V. Scheiber

## Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Komerční banky vyplníte pokladní složenku pečlivě ve všech kolonkách, tedy: *měna účtu*: Kč, č. *účtu*: 3330-021/0100, *měna hotovosti*: Kč, *částka*: kolik platíte, *jméno a příjmení*, adresa, RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně (EK Velim) do kolonky *Vklad jménem* a pošlete tajemníkovi jmenný seznam. Pokud posíláte peníze za sebe, **zopakujte v této kolonce své jméno**. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo v inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je vždy 0379.

Seznam čísel:

06940 členství ČES

06941 členství UEA

06942 předplatné Starta bez členství

06943 dary ČES

06944 zápisné do Odborné knihovny ČES.

50200 sekce železničářů

50400 komise pedagogická

50401 písemný kurs začátečníci

50402 písemný kurs pokročilí

50403 členství ILEI

50404 Paroliga kurso

50405 svazové zkoušky

50500 sekce přátel SAT

50600 sekce šachistů EŠLI

50800 sekce nevidomých LIBE

50900 sekce zdravotníků UMEA

51000 sekce křesť. esp. KELI

51100 sekce katol. esp. IKUE


70100 komise pro tisk a inf.

80200 ediční fond

80300 propagace v tisku

80400 fond Tilio

Pro jistotu napište tajemníkovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme řadu neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.



## Jak poslat peníze do zahraničí?

Pokud chcete zaplatit knihu, předplatné časopisu, účastnický poplatek apod. do zahraničí, pošlete peníze **mezinárodní složenkou MPI**, kterou si vyžádáte na poště.

## Aktualizace svazových stránek na internetu

Abychom mohli aktualizovat informace o našich klubech na svazových stránkách, potřebujeme spolupráci klubů a kroužků, tedy aby členové zkontrolovali, zda údaje o jejich skupině jsou stále platné a aby nahlásili změny tajemníkovi svazu.

**Periodikum Českého esperantského svazu (34. ročník)**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
malovec.starto@clavis.cz;  
www.clavis.cz/starto**

**Členská evidence a změny adres:  
Pavel Polnický, ČES**

**Uzávěrka dalšího čísla: 1.2.2004**

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (34-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 9 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
Ĉeĥio, e-mail:**

**malovec.starto@clavis.cz;**

**www.clavis.cz/starto**

**Presis: HRG Litomyšl**

**Redaktadfermo de la sekva numero :  
1.2.2004**

**ISSN 1212-009X**



## Donaco el Havířov

Estraro de Klubo de esperantistoj en Havířov decidis donaci al ĉiu abonanto de Starto unu bildkarton el la kolekto 2002. El kvar variantoj estis elektitaj du, sur kiuj estas iama kinejo Radost, en kiu estis Havířov proklamita urbo (4.12.1955) , statuo de ministro (skulptisto Stanislav Mikulášek, 1959), elementa lernejo en stilo "sorelo" kaj eblemo de la urbo.